NUMERO 8
ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org
5 MAR 2018

# NORDA ☆ KURIERO

## La Federacio jarfine festis komputike!






Sabaton la $9^{an}$ de decembro 2017 la Lilla klubo kaj la Federacio organizis Zamenhof-feston en MRES (Lillo). Partoprenis 30 homoj el norda Francio kaj Belgio en tre amikeca etoso.

La belga komputikisto Yves Nevelsteen prelegis pri komputilaĵoj kaj interretaj projektoj rilate al Esperanto. Kun granda intereso aŭskultis kaj diskutis la ĉeestantoj pri la nunaj kaj novaj retejoj, retvortaroj kaj poŝtelefonaj programoj.

La Flandra Esperanto-Ligo ofertis multajn librojn dum la vespero. La prelegon sekvis kuntrinkado kun muziko, kaj fine tre agrabla vespermanĝo en proksima kurda restoracio.




## Kunsidis la Federacia Komitato

Antaŭ la Zamenhof-festo kunsidis la Komitato de la Federacio. Jen ties ĉefaj konkludoj.

La **Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage** ne povis okazi pro manko da dediĉitaj homfortoj. Tial ĝin la Federacio endormigas, ĝis iu reiniciatos ĝin aŭ similan aranĝon.

La Federacio kaj la kluboj proponos en baldaŭa membrokunveno alpreni la **interasocian kotizo-sistemon** de UFE. Tiel klubano estus samtempe membro de la Federacio kaj de UFE.

Por konformiĝi kun la nova regiono el Nord-Pas-de-Calais kaj Picardie, la Federacio proponos en la membrokunveno novan nomon:

**"Espéranto Hauts-de-France"**

La Esperanta nomo restos sama: Nordfrancia Esperanto-Federacio.

# Jarkunvenis la Lilla klubo



Ĵaŭdon la 25an de januaro 2018 jarkunvenis la Lilla Esperanto-klubo. La membroj diskutis pri la pasintjaraj kaj baldaŭaj agoj, ankaŭ pri la regiona kaj landa asocioj. Fine renoviĝis la kluba estraro. Estis reelektitaj Xavier Dewidehem prezidanto; Michel Dechy vicprezidanto; Katja Boen sekretario; Dorine Francheteau vicsekretario. La multjara kasisto Richard Valet decidis transdoni sian oficon; sekve Anna Dupéchaud fariĝis la nova kluba kasisto.

# Esperanto-Sumoo en *Arras Matsuri*

La 14an kaj 15an de oktobro 2017 la japana artfestivalo *Arras Matsuri* venigis multnombran publikon de norda Francio kaj de la Pariza regiono. Tiu festivalo allogas multajn junulojn korligitaj al la japana kulturo, kiun ili malkovris tra la bildstriaj mangaoj.

Inter la diversaj budoj: origamio (faldado de papero), ikebano (florarto), japana kuirarto, sumoo (lukto-sporto), praktikado de Tajĉi, konkurso de *cosplay* (enscenigo de manga-herooj), nia asocio *Arras-Espéranto* animis budon dum du tagoj.

Por akordiĝi kun la festivala temo, ni prezentis la literaturan Esperanto-sumoon iniciitan de nia japana samideano Hori Jasuo.

Dek membroj de *Arras-Espéranto* fieras partopreni la Esperanto-sumoon, kiu iĝis vera impulso kaj sinergio por la disvolviĝo de nia literaturo.

Ankaŭ vi, karaj legantoj, partoprenu tiun literaturan ludon. Ĝi okazas ĉiun duan monaton samdate kiel la oficiala sumoo en Japanio. Oni elektas unu Esperantan libron kaj la nombron de paĝoj, kiujn oni legos ĉiutage.

*Arras Matsuri* estis okazo prezenti tiun iniciaton, eksponi la ricevitajn diplomojn kaj ĉefe informi pri Esperanto.




Joëlle, Corinne, Arlette, Marianne kaj Chantal vestis sin per japana kimono kun obio (la fama zono tri metrojn longa, kiun ili lernis nodi laŭ la tradicio). Kune kun Edmond kaj Didier, vestitaj ankaŭ per kimono, ili ĉiuj informis la interesitajn, scivolemajn junulojn.

La vetero sunis kaj varmis. En tiu etoso de juneco, gajeco, muziko kaj dancoj, ni bone reklamis pri Esperanto. Ni disdonis 300 kalendaretojn kaj flug-foliojn!

✎ *La klubanoj de* Arras Espéranto

# La lillanoj ludis Esperante en trinkejo




Renkontiĝi en agrabla Lilla trinkejo apud la strato Solferino (la t.n. “strato de soifo” de la lillanoj!) ne facilas vendrede vespere, sed nia klubo trovis tre agrablan lokon en la trinkejo Zythum… eĉ se iom brua.

Nia unua ludo iom similis al *Brin de Jasette* pro la demandoj, sed samtempe la ludantoj devis elpreni parteton el ĉiam pli suprengrimpanta turo sen ke la turo disfalu. Dua ludo estis Mistigri, tre amuza eĉ se iom malpli paroliga. Pluraj ĉeestantoj rigardis nian ludon, sed bedaŭrinde ne tro interesiĝis pri Esperanto. Eble venontan fojon! ✎ *Katja Boen*

# Novjara Renkontiĝo en Sarbruko





Kiel ĉiujare okazis la Novjara Renkontiĝo (NR), ĉi-foje en Sarbruko, apud la landlimo de Francio kaj Germanio. Ducent partoprenantoj venis ĝui la tre riĉan programon — preskaŭ tro riĉan kun ĝis 7 samtempaj proponoj, 2 aŭ 3 sinsekvajn fojojn matene kaj same posttagmeze.

Oni sufiĉe ofte estus ŝatinta partopreni plurajn je la sama horo, ekzemple prelegojn, diversajn korpajn aktivecojn, manlaboron, koruson, ktp. aŭ tutsimple promeni tra la montetoj kaj la bela malnova urbo. Por infanoj aparta programo tre allogis ilin, ankaŭ la ebleco havi novajn amikojn.

Vespere spektaklo en la granda salono kun kantisto, teatraĵo, aŭ muzikoj proponitaj de la partoprenantoj, aŭ ludvespero, aŭ babilado en la knajpo, ĉar ĉiam estas plezuro retrovi amikojn kaj koniĝi kun novaj personoj.

Venontjare NR okazos en Wiesbaden, pli sude. Tie ni havos okazon malkovri alian urbon, pri kiu ni certe reparolos…

✎ *Anna Dupéchaud*

# Fermo de la jaro Zamenhof en Unesko




Kiel esprimi mian dankemon, feliĉon? Malfacilas, tiom miaj sentoj ampleksas kaj superfluas je mia koro kaj menso. Kaj mi jam sentis tion antaŭ la tago mem!

Do, kiam mi envagoniĝis tiun $11^{an}$ de decembro, abundis ĝojo! Ho mia kor' ne batu maltranvile! El mia brusto nun ne saltu for, jam teni ne povas mi facile… Kaj la trajno kaj poste metroo facile kunportis min. Mia korpo kaj koro estis tre leĝeraj. Mi ŝvebis, kaj koro ŝvelis pro ĝojo.

Do, kiam mi vivanta eniris la "panteonon" (Unesko-ejon!) mi "saltis" sur miajn esperantajn gefratojn kaj tuj ebrie parolis Esperanton kaj senĉese babilis antaŭ malfermo de la ferma tago. Eĉ kun francoj, kiuj ne komprenas Esperanton, mi babilis senhezite en Esperanto. Kaj mi ne forlasis la internacian lingvon dum la tuta programo. Tro kontenta!

Poste venis trankviliĝo kaj paroladoj solenaj kaj iom tedaj. Sed tia estas ĉia grava evento, mi supozas.

Poste venis kelkaj sinsekvaj paroladoj. Mi nombris ses. Krom impona reklamado por Unesko-kuriero kaj ties patrono, nome Ĉina Popola Respubliko, mi aparte aprezis du gravajn kaj tre klerajn prelegojn.

Unue, tiun de la profesoro pri historio Jean-Claude Lescure, kiu rakontis, kial komence de la dudeka jarcento en Francio Esperanto floris kaj poste velkis, kaj li nomis la veran malamikon de Esperanto: naciismo.

Kaj, fine, ni aŭskultis registritan prelego-videon de la itala ambasadoro ĉe la Reĝlando Norvegio kaj la Islanda Respubliko, Giorgio Novello. Lia prelego en flua, rapida, vigla, lerta Esperanto ege mirigis kaj impresis min. Mi ne sciis, ke ekzistas en nia movado tia grava moŝto, tia gravega inteligenta eminenta intelektulo. Li parolis pri ekvilibro inter tradicio kaj novigo en Esperantujo. Bela optimisma konkludo de tiu tago.

Alia kortuŝa okazintaĵo por mi: mi havis la okazon saluti L. C. Zalewski-Zamenhof, la nepon. Mi premis lian manon, kaj estis kvazaŭ mi premus la manon de la kreinto, de la avo. Mia mano plu memoras!

Kaj mi ĉefe profitis tiun tagon por babili kun junuloj! Jes, ne nur olduloj kiel mi ĉeestis, sed ankaŭ multaj junuloj! La mondo sciu, ke Esperanto ne estas nur lingvo por blankkapuloj!

Kaj Olivia, civila servanino de la Tuluza asocio, kiu tenas la Unesko-kurieron… kaj glason da ĉampano ;-) intervjuis min. Kaj eblas aŭskulti min (vi bonŝancas!) per tiu ligilo tuj sube, inter la minutoj 15.30 kaj 18.40 de tiu elsendo. Vi plu scios pri miaj impresoj: *www.esperanto-midipyrenees.org/download/cat.php?val2=43_6_6_emissions+radio*

Kaj mi babilis ankaŭ kun Sacha, simpatia kaj vigla britino. Ŝajne ŝi estis kiel mi, ege kontenta ĉeesti! Vidu sube!

✎ *Jean-Claude Roy*






# Ni vizitis la Centran Oficejon de UEA!

Mia edzino Fabienne kaj mi vojaĝis al Roterdamo la 24an de novembro 2017 por ĉeesti la 47an malferman tagon en la Centra Oficejo de UEA!

Ni profitis la okazon por iom viziti la urbon vendrede kaj ĉefe pasigi la tutan posttagmezon en la vastega urba muzeo Boijmans van Beuningen. Ne eblas rakonti pri tiu arta sperto! Per la multnombraj diversaj salonoj oni vojaĝas de la mezepoko ĝis nuntempa arto. Ni interalie admiris la pentraĵon de Brueghel la Pliaĝa nomatan *La Eta Babelturo*!

Ni tranoktis en la hotelo Van Walsum, la hotelo de UEA! Ĝi situas 300 m for de UEA!

Kaj do la 25an de novembro okazis la malferma tago. Post tre bona nokto en vasta ĉambro, ni matenmanĝis en tiu hotelo. Mi rekomendas la gigantan matenmanĝon tie. Des pli bone por travivi la tagon… ĉar la programo de la tago ne enhavis tagmezan paŭzon… Prelegoj sin sekvis de mateno ĝis fino de posttagmezo. Feliĉe ni envenis relative frue, kaj do ni povis aĉeti kelkajn librojn en la libroservo.

Nur kelkaj vortoj pri la Centra Oficejo: duetaĝa domo starigita… en 1887! (laŭ demando de Riskoludo) kun multaj ĉambroj negrandaj, krom la konferencejo je la dua etaĝo. Atentu! La ŝtupoj estas mallarĝaj! Bedaŭrinde ne eblis viziti la bibliotekon Viktor Hodler.

Tie ni renkontis kelkajn eminentulojn: Roman Dobrzynski, Spomenka Stimec ktp. Kaj krom kutimaj tre maljunaj homoj (komunumo maljuniĝas!) ni diskutis kun diversaj junuloj, kiuj laboras kiel volontuloj en UEA. Kaj ege plaĉis al ni konstati, ke avangarda generacio ekagadas. Ili nomiĝas Rakoen el Belgio, Lucia el Ĉinio, Hoan el Vjetnamio, Nicoleta el Rumanio, Roxane el Francio ktp.

Pri la programo mem, jen kelkaj informoj por karaj legantoj de *Norda Kuriero*: la eŭropa parlamento decidis, ke 2018 estos la jaro de la kultura heredaĵo; kaj UEA decidis, ke 2018 estos por ni la jaro de la Esperanta kulturo. Ni ĉiuj festu dum la tuta jaro.



"Mi eniris la templon!"

TEJO parolis pri siaj multnombraj projektoj, kaj interalie Rakoen agadas ĉe Unesko. Junuloj parolis pri sia laboro en UEA, t.e. kolektado de elŝuteblaj varbiloj en kaj pri Esperanto en retejo.

Konklude: UEA estas nia domo. Ĝi situas meze de la granda kaj juna urbo Roterdamo, urbo, kiu estis la unua Eŭropa Junulara Ĉefurbo en 2009. Nia regiona urbo Amieno estos la 17a en 2020!

✎ *Jean-Claude Roy*

# Araso baldaŭ festos sian 25-jariĝon!

Dimanĉon la 30an de septembro 2018 la klubo Arras-Espéranto festos sian 25-jariĝon per organizo de bunta LingvoFestivalo en Araso. Tie estos prezentataj 25 lingvoj (laŭ la skemo de Dennis Keefe) kaj sekvos grandioza koncerto de JoMo kun gitaro! Pli da detaloj vi legos en la venonta *Norda Kuriero*.



# Ĉu vi "greziljonos" ĉi-jare?



La kastelo Greziljono (Grésillon) proponas abundan Esperanto-programon por la jaro 2018:

**20–28 aprilo:** PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Przemek, Christophe, Marion

**27–28 aprilo:** PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj.

**9–13 majo:** Korusa renkonto de Interkant' kun Zdravka Bojĉeva.

**9–13 majo:** ReVe, Renkontiĝo Vegana, kun prelegoj, kursoj, filmoj, koncerto de Jonny M.

**9–27 julio:** Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Danylyuk, Mikaelo Bronŝtejn.

**9–16 julio:** Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso.

**15–21 julio:** Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer.

**16–21 julio:** Speciala semajno kun kursoj de Esperanto kaj de la franca lingvo.

**21–27 julio:** Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK "Esperanto en Artoj".

**11–19 aŭgusto:** Festa Semajno por infanoj kaj familioj.

**26 oktobro–3 novembro:** AŬTUNE la Esperanto-ferioj, kun halovena festo kun Dennis Keefe.

**KOLOFONO**

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: **kuriero@esperanto-nord.org**